


Mº 04 - APR / 83

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República 54-29 andar - 20.211 - Rio de Janeiro-RJ BRASIL



## IMPRESSO

## PRI: UEA - Kotizoj ekde la la. de aprilo 1933

La 16an de la pasinta monato, BEL ricevis el la Direktoro de la C.O. de UEA klarigan cir kuleron datitan de 1983.03.10 pri la afero supre menciita.

Al tiuj, kiuj petos, ni plezure sendos kopion de la tuta cirkulero. Ĉi tie, ni nur trans kribas kelkajn frazojn pro manko de spaco:

Kroma komplikaĵo estas, ke en iuj landoj (Ekz-e Brazilo), la bankoj postulas altan imposton por la transpagoj eksterlanden, tiel ke la kotizperantoj devas ĉiuokaze anoncial la membroj pli altajn kotizojn, ol tiuj anoncitaj de UEA, se ili ne volas perdi konsiderin dajn sumojn ĉe la transpago.

Pro ĉio ĉi ni venis al konkludo, ke por tiaj landoj, kies valuto montras rapidan kurzoŝanĝon kontraŭ la guldeno, ni revenu al la iama principo fiksi de ĉi tie la kotizojn en guldenoj kaj lasi al la kotizperantoj mem decidi kaj diskonigi la ekvivalentojn en sia
propra valuto.....

altigo de la kotizoj, sed nur pri konstantigo de ilia valoro en guldenoj.

			KOTIZOJ EN	GULDENOJ		
LANDO	(j-)AM	MJ (-K)	MA (-K)	SA	Kto	SZ
Brazilo	0,78	15,60	39,00		11,70	

Post longa meditado kaj diskutado pri la kriterioj fiksotaj de BEL kaj KKE (ladu kotiz - perantoj de UEA em Brazilo), rilate al kalkulado de ekvivalentaj kotizoj en nia landa valuto, la estraranoj de ambaŭ organizoj venis al jenaj konkludoj:

1) Ekde la la. de aprilo, nek Brazila Esperanto-Ligo nek Kultura Kooperativo de Esperan - tistoj postulos de la membroj iun ajn ekstran procentaĵon pro la transpagaj kostoj;

2) La ekvivalenta kotiztabelo por Brazilo baziĝos sur la samaj valoroj fiksitaj de UEA, laŭ JARLIBRO 82, por la internacia respondkupono, tio estas: 1 rpk= 0,9 gld.;

3) La du perantoj akceptos de la membroj pagon, pere de respondkuponoj aŭ en ekvivalen taj kruzejroj;

4) Ĉar la prezo de internacia respondkupono, kvankam ne tiel ofte kiel la kurzo, ankaŭ - varias, estas konvene publikigi ĉi tie ĝian aktualan valoron: 1 rpk= Cr\$ 270,00. Sufi ĉas, ke la interesitoj demandu al iu ajn poŝta agentejo la kurantan prezon de la rpk por fari la nepran konverton al kruzejroj. Ekz-e, hodiaŭ(1983-04-05) 1 rpk=Cr\$270,00; do, por aliĝi kiel MA, oni devas sendi al BEL aŭ KKE, 44 rpk, aŭ Cr\$ 270,00 x 44 = Cr\$ 11.880,00;

5) Urĝas diskonigila jenan kotiztabelon, kiu validas ekde la la. de aprilo 1983 por Brazilo:

						<ul> <li>Contract of the contract of the c</li></ul>
	(J-)AM	MJ (-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
guldenoj	0,78	15,60	39,00	23,40	11,70	78,00
int.rpk	1	18	44	26	13	87

## SUDAMERIKA INTERŜANĜO

La trian de marto lasta, la vicprezidanto de BEL, D-ro Floriano Pessoa, vizitis la sidejon de Argentina Esperanto Societo, en Buenos Aires, kie li estis afable akceptita de pluraj samideanoj kaj interŝanĝis informojn pri la argentina kaj brazila movadoj.

EKSPOZICIO DE LIBROJ KAJ REVUOJ - 12/13 .03.83

En la 12a kaj 13a de marto dum la monata diservo de la sekcio Rio de Janeiro de la Monda Mesiisma Eklezio, la Asocio Mokiĉi Okada - kultura flanko de la Eklezio-prezentis ekspozicion de libroj kaj revuoj en kaj pri Esperanto, Centoj da personoj kontaktiĝis kun la internacia lingvo kaj pluraj enskribiĝis en la E-kurso, komenciĝinta en la kuranta monato.

ESPERANTA KUNFRATIĜO - 16.04.83

Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga (Rua Silva Cardoso, 673 - Bangu, Rio de Janeiro, RJ. CEP 21.810) okazigos Esperantan kunfratiĝon je la 16a de aprilo. Prelegos Prof. Jair Salles pri la temo "ESPERANTO SEN ANTAŨJUĜOJ". Horo: 19.00 h.

LANĈO DE ESPERANTA LIBRO - 23.04.83

En la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo (Praça da República, 54 - 29 andar, Rio de Janei ro, RJ.) la 23an de aprilo, je la 18a horo, estos lancita la libro MIKRONOJ (Distikoj el monosilabaj versoj), de la poeto Diderto Freto. Tiu libro estas unika en la monda literaturo de Esperanto, per sia originala formo. Ni do plezure invitas niajn samidea - nojn kaj amikojn de Esperanto por la evento.

" HEROLDO " KAJ " EL POPOLA ĈINIO " - Abonkotizoj

Kiel promesite en nia lasta "BEL-informas ", jen la ĝisdatigitaj klarigoj pri abonkotizoj, en nia landa valuto, de tiuj legindaj periodaĵoj:

1) Ĝis la 30a de la kuranta monato, la kotizoj restos senŝanĝaj, tio estas, la samaj jam de ni diskonigitaj;

2) Ekde la la. de majo, validos la suba tabelo. Rimarku, ke ni nur akceptos internaci - ajn respondkuponojn aŭ ilian respondan valoron en nia nacia valuto.

HEROLDO: marposte (20 rpk)

- aerpoŝte ( 27 rpk )

EL POPOLA ĈINIO:

PLENA ILUSTRITA VORTARO - Rezervu vian ekzempleron.

Ni ĵus mendis al SAT, 10 ekzemplerojn de PIV, ĉar la lastaj de ili senditaj rapide el ĉerpiĝis. Eble tiuj libroj alvenos ĉi tie post du aŭ tri monatoj (marpoŝta mendo). Se vi deziras, ke ni rezervu al vi ekzempleron, bonvolu tuj skribi al nia Asocio. Ni uzas la okazon por informi, ke ankoraŭ restas en nia libro-servo kelkaj ekzempleroj de PLENA VORTARO (Cr\$ 2.500,00). Profitu la ŝancon!

## VORTARO PORT/ESP - ESP/PORT. de Carlos Domingues

Ni konfirmis nian suspekton: La vortaro de Carlos Domingues elĉerpiĝis antaŭ la fino de marto. Ni jam komencis vendi la unuajn ekzemplerojn de la nova 3a eldono po Cr\$1.300,00.